Alia terura afero estas difekto de la nuklea centralo de Hukuŝima, kiu situas ĉe la maro en la gubernio Hukuŝima. Laŭ la registaro, la funkcio de akvo-liverado por malvarmigi la nukleaĵon estis difektita. Vespere la registaro ordonis la evakuon de

la loĝantoj ekster la radiuso de 3 kilometroj. En Japanio estas ĉirkaŭ 60 nukleaj centraloj, kaj la elektraj kompanioj ĉiam insistis, ke ili konstruis tiel forte tiujn centralojn, ke tiuj povas rezisti kontraŭ la plej fortaj tertremoj, sed jam en 2007 en la tertremo en la gubernio Niigata unu centralo estis difektita, kaj denove tiun ĉi fojon la alia. Ĉu la kompanio povos daŭre insisti la sekurecon de la nukleaj centraloj en la vulkana insularo Japanio?

Vespere en Tokio multaj homoj havis malfacilon. Ili ne havis rimedon por hejmeniri, ĉar ĉiuj transportad-servoj haltis. Multaj atendis buson, sed ĉiuj stratoj estis plene ŝtopitaj. Trajnoj ne funkciis. La registaro rekomendis, ke homoj ne revenu hejmen kontraŭ malfaciloj, sed restu kaj tranoktu ie en sekura loko. Ĝi malfermis lernejojn kaj publikajn halojn por tiuj nereir-povantoj. Mi multe kompatis ilin, ĉar ankaŭ mi povus esti inte ili. La 10an mi revenis hejmen el Nepalo. Se mia reveno estus unu tagon malfrua, mi estus envolvita en tiu kaoso kun granda valizo. Mi estis bonŝanca, sed eble estis multaj malŝanceloj, kaj precipe mi timis pri eksterlandaj turistoj en Tokio. Ĉu japanoj bonkore traktis ilin?

Ĝis la meznokto la nombro de la mortintoj estis ĉirkaŭ 60, sed mi antaŭvidis, ke la nombro superos 1000, ĉar informoj el diversaj urboj ne atingis la registaron. Laŭ la bordo de la pacifika Oceano situas multaj malgrandaj havenoj funde en la golfeto, kaj tiuj certe estas tre malfortaj kontraŭ tiu granda cunamo. Mi povus helpi la suferantojn, sed mi havis neniun rimedon, do mi kun malĝoja sento enlitiĝis. Pri la tertremo la registaro klarigis, ke la skalo estis 8,8 magnitudoj, la plej granda tertremo en nia historio. Laŭ la klarigo de iu TV-stacio, troviĝas 4 nestoj de tertremo laŭ la bordo de la regiono Tohoku kaj ĉi-foje ĉiuj kvar samtempe aktivis. Neniuj sismologoj antaŭvidis tion. Pro tiu grandskaleco ĉiuj orientaj kaj nordaj gubernioj, de Tokio al Aomori, ricevis damaĝon. Eĉ en mia gubernio unu virino mortis pro falintaj tegoloj.

La 12an de marto

Ellitiĝinte mi tuj ŝaltis la televidon. Mi supozas, ke ĉiuj TV-stacioj dumnokte kaj sen reklamoj elsendis la programon pri la tertremo. Mi neniam vidis aliajn programerojn, nek aliajn novaĵojn.

La unua bildo, kiun mi rigardis, estis tiu de la urbo Rikuzen-Takada kun la loĝantaro de 28000. En la bildo nenio restas krom kelkaj grandaj betonaj konstruaĵoj. La pejzaĝo estas kvazaŭ la bildoj de Hiroŝima kaj Nagasaki post la eksplodo de la atombombo en 1945. La urbo estis gardata per kelkmetrojn alta digo, sed la ondego facile superis ĝin kaj detruis la tuta urbon. Sekvis aliaj bildoj, en kiuj simile montriĝis detruitaj urbetoj kaj vilaĝoj. Ĉar laŭ la bordo de tiu regiono frontanta al la Pacifika Oceano estas malgrandaj golfoj,

kutime tre sekuraj kontraŭ tajfunoj, sed cunamo facile viktimiti tiujn vilaĝojn kaj havenojn, ĉar ĝia ondego koncentriĝas pli kaj pli, farante pli kaj pli grandan ondon al la profundo.

Aperas bildoj de izolitaj konstruaĵoj ĉirkaŭataj de restanta marakvo, sur kies tegmento estas la literoj de SOS, bildoj de elreliĝintaj kaj falintaj vagonoj kaj maltrankvilaj mienoj de rifuĝintoj.

Post la tagmanĝo mi ekstereniris. Hodiaŭ estas sabato, do kutime mi vidas multajn biciklistojn sur la biciklista vojo, sed hodiaŭ nenion. Ŝajnas al mi, ke la tuta kvartalo funebras.

Mi telefonis al esperantistoj en la urboj Sendai kaj Hukuŝima, kaj mi sukcesis kontakti unu en Hukuŝima. Ŝi diris: “Kiam okazis la tertremo, mi ĵus finis la butikmadon kaj estis ekster la vendejo, kaj mi sentis, kvazaŭ mi malsaniĝus, ĉar mia korpo tiom ŝanceliĝis. Via telefono estas la unua post la tertremo.”

Posttagmeze venis terura novaĵo: oni eligis aeron enhavantan nukleaĵon el la centralo de Hukuŝima. Mankis akvo por malvarmigi la nulkean centron, kaj la premo de la aero en la ujo estis tiel alta, ke ĝi povos detru la ujon mem. Por eviti tion, oni ellasis la aeron por malaltigi la premon. La aero konsistas el 90-oble pli densa nukleaĵo ol la normala. Mi ofte diris al miaj studentoj, ke ŝajne Japanio prosperas, sed se okazus grava akcidento de nuklea centralo, tia prospero momente malaperus. Tiu timo, kiun mi jam longe havis, povos fine efektiviĝi.

Je la 3a kaj 36 minutoj okazis eksplodo en la unua nuklea centralo de Hukuŝima, kaj la registaro klarigis, ke en ĝi okazis solviĝo de la nuklea bastono en la mezo de la centralo. Evakua zono pligrandiĝis ĝis la 20 kilometroj radiuse. En la televida bildo tiu centralo estas kvazaŭ skeleto kaj la supra parto de la konstruaĵo estas malaperinta. Nukleaĵo povas rapide disvastiĝi, do la danĝero povos veni ne nur al la loĝantoj ĉirkaŭ la centralo, sed ankaŭ al ĉiuj japanoj, kaj eĉ al koreoj, ĉinoj kaj tajvanoj. Je la 5a horo la nombro de mortintoj kaj malaperintoj estis 1600. La registaro petas, ke ĉiuj malŝparu elektron, ĉar multaj elektraj centraloj estis difektitaj kaj manko de elektro estas antaŭvidata. En multaj nordaj gubernioj elektro haltis kaj oni vivas en mallumo.

La 13an de marto

Mi ellitiĝis je la 7a kaj tuj ŝaltis la televidilon. Mi tre timis la malboniĝon de la funkcio de la nukleaj centraloj. Jam en la lasta vespero, okaze de la eksplodo de la kovrila domo de la unua centralo, 150 homoj estis surverŝitaj per eliĝinta nuklea gaso. La registaro diras, ke tiu kovrilo estas simpla kovrilo kaj ne rilatas al la grava akcidento, sed ĉu tio estas vero?

Televideo diris, ke ankaŭ en la tria centralo ekestis malbonordo pri la malvarmigo. Je la 9:08 por malvarmigi la fornon oni komencis enverŝi akvon ĉirkaŭ ĝi, sed tio ne glate iris, do oni antaŭvidas la eblecon de eksplodo same kiel en la unua centralo. La registaro diris, ke ankoraŭ ne ekzistas rimedoj por haltigi la fornojn, kaj ke 70-80 mil loĝantoj ĉirkaŭ la centraloj devos evakuii. Tagmeze venis telefono el mia amiko en Hokongo, kiu planas viziti min la 23an de marto. Li diris, ke liaj familianoj rekomendas, ke li ne iru al Japanio pro la nukleaj akcidentoj. En televideo oni raportis, ke en Eŭropo en multaj ĵurnaloj tiuj akcidentoj de la nukleaj centraloj estis la plej grava novaĵo.

Posttagmeze mi provis telefoni al esperantisto en la urbo Morioka en la gubernio Iŭate, kaj sukcesis kontakti ŝin. Ŝi diris, ke ĵus elektro kaj telefono ekfunkciis kaj mia telefono estas la unua. Ŝi diris, ke ŝi spertis nekutime teruran tertremon la 9an, du tagojn antaŭe, kaj sentis, ke io ne ordinara okazos.

Vespere la registaro klarigis jenajn aferojn:

1. La grandeco de tiu tertremo estis magnitudo 9,0 laŭ la rekalkulo de la fortenco. Jen estis la plej fortaj tertremoj de la 1950-aj jaroj:

1952 Kamĉatko 9,0 - 1957 Aleŭtoj 9,0 - 1960 Ĉilio 9,4 - 1964 Alasko 9,4
2004 Indonezio 9,0 - 2011 Japanio 9,0

Ĉi-foja tertremo estis kaŭzita per la movo de la tavolo 500 kilometrojn longa kaj 200 kilometrojn vasta, kaj daŭris pli ol 5 minutoj.

2. Damaĝoj konataj ĝis la vespero: Mortintoj: 1049 ; Malaperintoj: pli ol 1000
Malaperintaj vilaĝ(et)oj: pli ol 10 ; Frakasitaj domoj: 5700

Rifuĝintoj: 310 mil en 1892 rifuĝejoj

La poliestro de la gubernio Mijaĝi esprimis sian antaŭvidon, ke nur en lia gubernio mortintoj superos 10 mil. Li povas esti prava. En la urbo Minami-Sanriku 10000 el 17000 loĝantoj malaperis. En tiu urbo la du-etaĝa urbodomo tute malaperis kaj la 4-etaĝa betona hospitalo estis inundita ĝis la kvara etaĝo. En la urbo Rikuzen-Takada 15000 el 23000 loĝantoj malaperis kaj 5000 domoj estis tute frakasitaj. Certe estas aliaj vilaĝetoj laŭ tiu marbordo, kiujn oni ankoraŭ ne povas kontakti, kaj tie estas senhelpaj viktimoj.

Al tiuj rifuĝintoj mankas benzino, petrolo, elektro, gaso, akvo, kovriiloj, medikamentoj kaj manĝaĵoj. La surteraj vojoj estas blokita per betonaj kaj lignaj rubaĵoj, do oni planas transporti la necesaĵojn de la maro, helpe de la japana defendkorpuso kaj eĉ de la usona aviadilŝipo Donald Regan kaj aliaj militŝipoj.

3. Manko de elektro

Ne nur en la damaĝitaj regionoj sed ankaŭ en aliaj gubernioj ĉirkaŭ Tokio mankos elektro, ĉar multaj elektraĵ centraloj estas damaĝitaj. Por konkeri tiun

malfacilon la registaro instrukiis al la Elektro Kompanio Tokio, ke ĝi liveru elektron vice de unu distrikto al la alia, kaj al kompanioj kaj la popolanoj, ke ili ŝparu elektron. Vespere la ĉefministro Kan aperis en televido kaj esprimis sian kondolencon kaj kompaton kaj petis kunlaboron de la tuta popolo, apelaciante: “Japanio povas certe venki tiun malfacilegon!”

La 14an de marto

Mi ellitiĝis je la 7a horo. Televido raportis, ke okazas kaoso en ĉiuj stacidomoj, ĉar la elektro kompanio Tokio estis anoncinta malmultigon de elektro-liverado lastan vesperon kaj laŭ tiu anonco trajnkompanioj malmultigis aŭ ĉesis la servojn. Homoj ne estis sufiĉe informitaj pri tio kaj ĉe la stacidomo unuan fojon sciis la situacion. Ankaŭ en mia gubernio (100 kilometrojn fore de Tokio) oni ĉesis ĉiujn trajnservojn. Eble pro tiu influo lakto ne estis liverita al mia hejmo.

Je 7:16, je 10:02, je 12:10, je 3:12 kaj je 3:52 okazis tertremoj, iuj okazis laŭ la maro, iuj okazis en la montaro. Ŝajnas al mi, ke la tuta japana insularo eltenas doloregon post la granda operacio, nome la grandega tertremo.

Kio okazis al la nuklea centralo? Troviĝas 4 malnovaj nukleaj fornoj. La kovrila domo de la unua forno jam malaperis pro la hidrogena eksplodo. Nun la tria forno estis en la sama stato. Oni enverŝas marakvon por malvarmigi la fornon, sed ial ne sukcesas plenigi la ujon per akvo. Laŭ la klarigo de sciencistoj, la nivelo de la kvanto de disĵetita radioaktiveco estas malalta jene:

1000 mikro-Sievert: la kvanto da radioaktiveco, en kiu homoj povas vivi unu jaron senprobleme.

1557 mikro-Sievert: la kvanto, kiun la unua forno de Hukuŝima disĵetis ĉi-foje.

2400 mikro-Sievert: la kvanto, kiun homoj estas nature eksponataj dum unu jaro.

4000 mikro-Sievert: la kvanto, kiun homoj ricevas dum la radiografiado.

100000 mikro-Sievert: homoj suferas pro akuta radioaktiva malsano kiel vomado.

200000 mikro-Sievert: homoj povas morti.

Je 11:01 eksplodo okazis en la kovrila domo de la tria forno kaj la forno nudiĝis. La registaro ordonis, ke homoj en la radiuso de 20 kilometroj de la centralo sin fermu en la domo. Por gardi sin kontraŭ radioaktiveco oni devas kovri la buŝon per masko, demeti vestaĵojn antaŭ ol eniri domon kaj eviti manĝi malpurigitajn manĝaĵojn. Tio estas tre simpla kaj primitiva same kiel eviti polenalergion aŭ gripo!

Mi rememoras la vortojn de jam forpasinta d-ro Takagi Ĵinzaburoo, sciencisto pri nukleo kaj aktivisto kontraŭ nukleaj centraloj, kiujn li diris al mi, kiam mi ekiros al la UK en Varsovio en 1987. Li rekomendis, ke mi ne iru al Pollando, ĉar tie estas plena de radioaktiveco el Ĉernobil. Li aldonis, ke se mi iros, mi aĉetu ĉokoladon por li, ĉar en ĉokolado multe akumuliĝas radioaktiveco kaj per ĝi li povos analizi la situacion. Malgraŭ lia rekomendo mi partoprenis en la UK, do mi kaj aliaj 6000 partoprenantoj jam sufiĉe enspiris bongustan radioaktivecon tiutempe. Sed mi vivas ĝis nun, do ni ne timu radioaktivecon, des malpli la malmulte da kvanto elĵetita el tiu forno! Krome la registaro garantias al ni la sekurecon, klarigante, ke oni ne trovis ion nenormalan en la aero elĵetita el tiuj fornoj. Kredu ĝin, la popolanoj!

Vespere ni kuris al la najbara vendejo por aĉeti kandelon, ĉar la elektra kompanio Tokio anoncis, ke ĝi povos haltigi liveradon de elektro en mia urbo de la 17a ĝis la 19a. En la vendejo jam preskaŭ elĉerpiĝis kandeloj kaj poŝlampo, kaj mi povis aĉeti nur iom da vaksaj kandeloj. Tamen tio tute ne gravas, ĉar mi kaj mia edzino plurfoje vojaĝis al Nepalo, kie regule kaj ofte okazas paneo de elektro kaj ni jam spertis multajn senlumajn noktojn. Tamen feliĉe mia urbo estis ial ekskludata kaj ni havis luman vesperon.

Laŭ Televido jen estas la nuna situacio pri la urboj kaj vilaĝoj damaĝitaj de la tertremo, pri la socio kaj pri ekonomio: Mortintoj: 1834 ; Malaperintoj: 15000 ; Rifuĝintoj: 450000.

Inter tiuj rifuĝintoj estas multaj malfortuloj. Ili vivas sen sufiĉe da manĝaĵoj kaj akvo en malumo kaj en malespero. Ili estas bonŝance savitaj, sed atendas ilin manko de ĉiutagaĵoj, poste certe gripo kaj pli poste senlaboreco. Pro la damaĝoj kaj manko de elektro ne funkcias aŭtomobil-kompanioj Toyota, Isuzu kaj aliaj, elektro-kompanioj Hitaĉi, NEC kaj Fuĵicu, kaj kelkaj magazenejoj de Micukoŝi, Takaŝimaja kaj aliaj. Japanaj akcioj estas vendataj kaj nur en mateno la prezo malaltiĝis je pli ol 500 enoj.

En Japanio troviĝas ĉirkaŭ 60 nukleaj fornoj. La konstruadojn iniciatis tiama Liberala Demokratia Partio, la kapitalista mondo kaj elektro-kompanioj, ĉiam mensoge insistante la sekurecon kaj frapante la vangojn de kontraŭantoj per faskoj da bankbiletoj. Japanio estas vulkana lando kaj situas sur la granda nesto de tertremoj, do estas tute klare, ke konstrui nukleajn centralojn en tiu insularo estas danĝerege, sed mono regas la mondon. Por profiti, ili faras ĉion, kaj la rezulto venis hodiaŭ.

Mi longe opinias, ke Japanio ekspluatu sunenergion anstataŭ atom-energio. Japanio havas sufiĉe altan teknologion por tio, kaj se ni sukcesos tion, ni povos gvidi la tutan mondon en tiu kampo. Tamen la industria mondo ne havis tiun

perspektivon kaj direktis sin al mono, kiu vidiĝis ĝuste antaŭ iliaj okuloj. Mi deziras, ke Japanio nuligu ĉiujn nukleajn centralojn kaj direktu sin al pli sana energio. Dume ni havos malfacilon, sed tiu direkto vere garantios feliĉon al ĉiuj popolanoj kaj al la mondo.

Fine mi dankas al la mondo, kiu sendas savotrupojn kaj proponas la helpon al Japanio. Ĝis nun helpas nin trupoj el Koreio, Singapuro, Meksiko, Ĉinio, Germanio, Usono, Svislando, Novzelando, Aŭstralio, Tajvano, Britio, baldaŭ Francio kaj Rusio.

Mi esperas, ke morgaŭ mi povos raporti pli optimisme.

La 15an de marto

Nun, je la 22a kaj 28 minutoj, mi sentis grandan tremon. Tiu ĉi estas la plej granda tertremo post tiu grandega tertremo. Ĝia epicentro estis en la gubernio Ŝizuoka, en kiu situas monto Fuĵi. Sismologoj antaŭvidas kun certeco, ke laŭ la marbordo de tiu gubernio okazos granda tertremo en la proksima estonteco, sed ĝis nun malofte okazis tertremoj ĉi tie kaj des malpli enlande de tiu regiono. Antaŭ 300 jaroj la monto Fuĵi erupciis, do homoj foje timas ĝian denovan erupcion. Hodiaŭ vespere mi havis kunsidon kaj tie iu montris al mi romanon pri la grandega tertremo kaj la sekvantaj akcidentoj de nukleaj reaktoroj en Japanio, tial la ĵus okazinta tertremo donis al mi ne malgrandan ŝokon, kvazaŭ la simila krizo atakus Japanion. Ĝis hodiaŭ klariĝis, ke ĉiuj 4 reaktoroj en la nuklea centralo de Hukuŝima estas grave difektitaj, kvankam iliaj funkcioj estas haltigitaj:

Pri la 1a kaj la 3a, jam la kovrilaj domoj estis eksploditaj kaj oni nun malvarmigas la reaktorojn per mara akvo.

Pri la 2a, je 6:14 aŭdiĝis eksplodbruo. Oni supozas, ke parto de la subprema akvujo (angle, suppression pool) estis difektita.

Pri la 4a, kiu ne funkciis, kiam okazis la tertremo, akvo mankas al la konservejo de brulaĵbastono kaj tio kaŭzas ĝian varmiĝon. La samo povos okazi al la 4a kaj la 5a.

Pro tiuj problemoj la registaro ordonis al la loĝantoj inter la radiusoj de 20 kaj 30 kilometroj ne ekstereniri kaj fermi sin en konstruaĵoj. Homoj loĝantaj eĉ ekster tiu radiuso sentas sin timigitaj kaj mem decidis translokiĝi al aliaj regionoj. La vojoj al Tokio kaj aliaj lokoj estas plene ŝtopitaj per aŭtomobiloj. Posttagmeze en Tokio kaj la ĉirkaŭaj urboj oni kaptis nekutiman kvanton da radioaktiveco:

Iŭaki (sude kaj proksime de la centralo): 23,72 mikro-Sievert (?-oble)

Tokio: 0,809 mikro-Sievert (22-oble pli granda ol antaŭe)

Saitama: 1,222 mikro-Sievert (40-oble), Maebaŝi (mia urbo): 0,218 (15-oble)
Tamen oni diras, ke tiu kvanto tute ne gravas por nia korpo.

Laŭ la novaĵo en televido, je la 22a horo mortintoj estas 3373, malaperintoj 6746 (subite la nombro malgrandiĝis. Kialon mi ne scias, eble eraro?) kaj rifuĝintoj 440000, inter kiuj estas inkluzivitaj loĝantoj kiuj rifuĝis pro la nuklea akcidento. Multaj rifuĝintoj estas maljunaj (ĝenerale pli ol 25% de la loĝantoj en Japanio estas maljunaj, kaj des pli maljunaj estas loĝantoj en provincaj urboj) kaj malsanaj, tial la vivo en rifuĝejoj fariĝos pli kaj pli severa por ili.

Unu sola bona novaĵo hodiaŭ estas, ke du homoj estis savitaj el la ruinoj 90 horojn post la tertremo.

La 16an de marto

Hodiaŭ matene finfine mi ricevis retmesaĝon de s-ro Teduka, kiu loĝas en la urbo Tagaĵoo atakita de la cunamo. Li skribis jene: “Mi fartas bone. Mia domo ne estas difektita per la tertremo, sed diversaj servoj ankoraŭ ne funkcias. Mankas bezino, do mi decidis ne uzi aŭtomobilon. Ĝis hieraŭ mi vidis flamegojn kaj fumojn el la benzinrezervejo. Sur la stratoj ne foraj de mia hejmo estas tie kaj ĉi tie disĵetitaj multaj aŭtomobiloj kaj grandaj ŝarĝaŭtoj transportitaj per la cunamo”. Hodiaŭ matene en mia gubernio multe ventis. En la Toohoku-regiono multe neĝis! Kiel malvarme kaj solece ili pasigis la nokton! Mi ne povis ne plori. Hodiaŭ vespere ni planis havi estraran kunsidon de Kantoo-Esperanto-Ligo en Tokio, sed ni nuligis ĝin, ĉar la trafika servo ne estas normala. Jam multaj kunvenoj estas simile nuligitaj: La 12an kaj la 13an en mia gubernio okazus la tutlanda edukada kunveno, en kiu mi partoprenus, sed oni nuligis ĝin. Tutlandaj kaj internaciaj konkursoj de teniso, golfo, maratono, skiado ktp., kiuj okazus en la lasta semajnfino, estis nuligitaj. Baldaŭ komenciĝos la profesia basbalkonkurso ĝis aŭtuno, sed ĉar unu teamo havas sian bazon en la urbo Sendai trafita de la tragedio kaj ĝia basbalejo estis difektita, oni decidis prokrastigi la komenciĝon. En la venonta semajno komenciĝos Tutlanda basbalĉampioneco inter superaj mezlernejoj, kaj la okazigon aŭ prokrastigon oni decidis baldaŭ. Partopreni en ĝi kiel reprezentantoj el la gubernioj estas granda revo kaj honoro de lernantaj basbalistoj, tial se oni nuligus la okazigon, tio estus granda ŝoko kaj malespero por tiuj. Marto estas monato por kursofinaj ceremonioj, sed oni ne povas okazigi tiun ceremonion en multaj urboj. En televido mi foje vidas jam preparitajn ornamojn por tiu ceremonio en la granda salono de lernejo, kiun oni nun uzas kiel rifuĝejon. Laŭ ĵurnalo Asahi, en mezlernejo en la urbo Kurihara, oni okazigis la ceremonion. Tiuj kursofinantoj jam en 2008 spertis grandan tertremon, kaj ĉi-foje denove tiun tragedion.

Sugaŭara Ŝun, unu el la kursofinintoj, diris kun larmoj: “Mi pensis, ke ni ne havos la ceremonion. Ĉiuj suferas multe, do des pli kuraĝe mi paŝos antaŭen kun espero”. Kaj samtempe tiuj nuligoj donas grandan damaĝon al la ekonomio. En februaro nove ekfunkciis Ŝinkansen (rapida trajno) de Tokio al la urbo Aomori situanta ĉe la pinto de la Honŝuu-insulo, sed nun pro la tertremo tiu linio ne funkcias. Oni multe atendis turistojn, precipe en la sezono de sakuro, sed multaj homoj ne emas vojaĝi en tia malĝoja etoso. Certe sekvas bankrotoj de hoteloj kaj maldungoj. Damaĝo de la tertremo estos ne kalkuleble granda por nia ekonomio.

Kiel oni traktas kadavrojn? En Japanio nuntempe preskaŭ ĉiuj mortintoj estas kremaciitaj, sed en tiu ĉi kriza situacio tio ne eblas, tial la ministro de bonfarto decidis specialan regulon, por ke oni povu enterigi tiujn mortintojn sen permeso de la urba aŭ vilaĝa estro, sed nur kun mortatesto de kuracisto. Kiam oni ne povos identigi kadavron, oni fotos ĝin, konservos ĝiajn harojn kaj enterigos ĝin. Estas malĝoje, ke multaj homoj finas sian vivon tiamaniere. Temas pri la reaktoroj, la situacio estas preskaŭ sama kiel hieraŭ. Oni planis malvarmigi la reaktorojn, ĵetante akvon el helikopteroj, sed anticipa mezurado de radioaktiveco sur tiuj trovis ĝin tro forta, ke oni ĉesis plenumi tiun projekton. Laŭ la veterprognozo ankaŭ morgaŭ estos tre malvarme kaj neĝos en la norda regiono.



La 17an de marto Hodiaŭ matene estis tre malvarme kaj ventis forte. En mia domo, kiam mi vekiĝis, la temperaturo estis 1 grado. Toohoku-regiono situas pli norden, do estis pli malvarme. Tagmeze la temperaturo en mia ĉambro estis 7 gradoj. Estis tro malvarme, ke mi vestis min kiel ninĵa. En la 3a reaktoro kaj en la konservejo de la nukleaj bastonoj de la 4a reaktoro jam akvo forvapiĝis kaj radioaktiveco ekstereflugas. Je 9:43 oni verŝis 7,5 tunojn da akvo sur la 3an reaktoron kvarfoje per helikopteroj, sed la efiko estas dubinda, ĉar la akvo ne multe trafis ĝin. Oni planis ĵeti akvon en la 3an reaktoron de ŝpruckamionoj 50 metrojn fore de la reaktoro, sed pro tro forta radioaktiveco oni ĉesis plenumi tiun planon. Fine vespere je 19:55 oni komencis fari tion. Por plenumi tiun akvoĵetadon, defendkorpuseroj kaj policianoj devas riski sian vivon, sed la situacio estas tiel kriza, ke la registaro devis fari tiun decidon.

*Japanio ne havas armeon, sed armesimilan defendkorpuseron. La konstitucio malpermesas posedi armeon, ĉar ĝi malpermesas militon.

Vivoj en rifuĝejoj pli kaj pli malfacilas, ekzemple:

1. En la gubernio Fukuŝima 14 maljunuloj en la hospitalo mortis.
2. Rifuĝintoj kolektas neĝon por necesejoj.
3. En al urbo Kamaiŝi en la gubienio Iwate estas ege malvarme. En iu rifuĝejo restas nur 140 litroj da petrolo, t.e. kvanto por du tagoj. Gaso mankas. Homoj manĝis varman manĝaĵon nur dufoje dum la pasintaj 6 tagoj. Oni ne povas enmanigi medikamentojn pro manko de benzino por aŭtomobiloj.
4. En la urbo Kesenuma en la gubernio Iwate, iu benzinstacio disdonis petrolon senpage, sed ne eblis plu pro manko de benzino por pumpi rezervitan petrolon.
5. En la urbo Mijako en la gubernio Iwate, 70% de la rifuĝintoj en iu rifuĝejo estas pli ol 70-jaraj, sed ne estas kuracisto por ili.
6. En la urbo Sendai malfermiĝis matena bazaro. Unu brasiko kostis 500 enoj (5 eŭroj).

Pro manko de elektro en Kantoo-regiono (Tokio kaj ĉirkaŭaj gubernioj), magazenejoj, poŝtoŝtancoj kaj multaj vendejoj frue aŭ tute fermiĝis.

* Nun ĵus antaŭ 22a horo okazis relative granda tertremo (magnitudo 5,8 for de la marbordo de la gubernio Ibaraki). Mia ĉambro skuis multe.

Homoj loĝantaj proksime de la nuklea centralo komencis translokiĝi en aliajn guberniojn. Ĉiuj 300 mil homoj en la urbo Minami-Sooma en la gubernio Fukuŝima rifuĝis en aliajn urbojn laŭ la ordono kaj aliaj 9653 homoj jam fuĝis memvole. Ankaŭ miaj du konatoj komencos translokiĝi:

Filino de mia amiko, kiu loĝas en la gubernio Kanagaŭa, apuda gubernio de Tokio, decidis translokiĝi al okcidenta urbo. Ŝi havas unu-jaran bebon, pro kio ŝi decidis la translokiĝon. Alia konato, kiu loĝas en la gubernio Ibaraki, najbara gubernio de Fukuŝima, 120 kilometrojn fore de la nuklea centralo, skribis: “Se la situacio ne boniĝos baldaŭ, mi devas decidi por eviti radiokativecon”.

Hodiaŭ la defendkorpuso komencis varbi eksajn korpusanojn por kompensi mankon de la korpusanoj (jam duono de ili, 100 mil, estas mobilizitaj). Tiu sistemo ja ekzistis, sed neniam antaŭe oni uzis ĝin. Tamen labori tiele, nome por la bono de la popolo, estas pli bone al ili, ol batali en milito por mortigi aŭ esti mortigitaj. Ĝis hodiaŭ estas ; Mortintoj: 5583, Malaperintoj: 9594, Rifuĝintoj: 30578 en 2260 rifuĝejoj.

La 18an de marto La registaro konstatis, ke la nivelo de la nuklea akcidento estas 5, same kiel tiu de Three Mile en Usono. Por malvarmigi la reaktoron, hodiaŭ oni faris jenajn aferojn:

Antaŭ la dua horo posttagmeze, oni ĵetis 50 tunojn da akvo en la 3an reaktoron el specialaj fajrokamionoj. Ŝajne estis iom da efiko, ĉar oni povas vidi vaporon el la

centralo. Oni provis refunkciigi elektran sistemon damaĝitan per la cunamo, kiu ebligas malvarmigi la reaktorojn. Tamen en la tereno ekzistas forta radioaktiveco, do oni povas fari tion malrapide. La respondeculoj volas, ke la sistemo refunkciu ĝis morgaŭ. En televido anoncistoj simple raportas, ke oni klopodas fari iujn aŭ aliajn aferojn en la nuklea centralo de Fukuŝima, sed en kia kondiĉoj laboristoj tie laboras? La 15an, TV raportis, ke 750 simplaj laboristoj fuĝis ekster la centralon kaj restas 50. Hodiaŭ aperis artikolo pri tiuj laboristoj. Mi resume tradukas la vortojn de unu el tiuj fuĝintoj: “Kiam okazis la tertremo, mi estis en la centralo. Atakis min grandega tremo, kaj tuj poste atakis grandega cunamo, kiu forportis ĉiujn bluraĵojn kaj maŝinojn. Ni strebis refunkciigi la sistemon por malvarmigi la centralojn, kolektinte ĉiujn bateliojn, sed vane. Kelkcent laboristoj alterne laboris por la riparado, sed postaj tertremoj nuligis niajn ĉiujn strebojn. Ni ne povis bone dormi pro la sinsekvaj tertremoj, nek manĝi pro streso. Ekmankis akvo kaj ĉiuj plendis pro malbona sanstato. Ni demandis nin, kiom da radioaktiveco ni ricevis, ĉu la reaktoroj eksplodos kaj ĉu granda kvanto da radioaktiveco ŝprucos sur multajn homojn. Mi foje pensis, ke la kompanio forĵetos nin, tamen samtempe ni decidis, ke ni ne rajtas forlasi tiun ĉi lokon ĝis la popolanoj povu vivi trankvile”. Por bonteni nukleajn centralojn, elektraj kompanioj bezonas multajn laboristojn, ĉar laŭ la strikta leĝaro estas malpermesite al tiuj laboristoj ekspone sin al pli ol la difinita kvanto da radioaktiveco. Tial ili ofte laboras nur kelkajn minutojn tage por ke ili ne plu ricevu pli da radioaktiveco ol la limkvanto. Ordinaraĵoj ne volas fari tian vivriskan laboron, tial la kompanioj ofte varbas senlaborajn homojn en grandaj urboj, proponante altan salajron, pere de suspektindaj, nigraj organizoj, nome jakuza, japanaj mafioj. La kompanioj ĉiam fanfaronis pri tio, ke nukleaj centraloj estas sukuraĵoj kaj atom-energio estas pura, sed malantaŭ la luma scenejo estas tia malbelajaĵo.

Jen miaj tankaĵoj, tradiciaj japanaj poemoj kun 5-7-5-7-7 silaboj:

Homoj kutime
salute promenadis,
sed nun senvorte
interrenkontas ĉiuj
en printempa krepusko.

Malaperis lum’
malaperis pasantoj
en la urbcentro.
La katastrofo fora
ventas ankaŭ ĉi tien.

Ĝis hodiaŭ estas : Mortintoj: 6548 ; Malaperintoj: 10354

Rifuĝintoj: 280463 en 2304 rifuĝejoj.

Nombro de mortintoj superis tiun de Hanŝin-Awaĵi-tertremo okazinta en la urbo Koobe en 1995.

Sekvota (?)